# TAMEN ★ PLU!

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO OKTOBRO 2006 / JARKOLEKTO 25

*Bob Felby - Tel (08) 8242 1460 - 6 Dorset St. Semaphore Park. S.A. 5019 - esperantobob@iprimus.com.au*

*Ankaŭ disponebla surrete ĉe la retejo de Esperanto en Sudaŭstralio: http://sa.esperanto.org.au*



**Forpasis William Auld la 12an de septembro 2006**



**Forpasis Edna Turvey la 30an de julio 2006**

## Edukado



**Se vi vere deziras lerni kiel senerare uzadi Esperanton, tiam trastudu pli ol nur unu fojon la verkon por la nova jarmilo: "Lingvaj Resondoj".**

**Tiu ĉefverko de la fama Esperantologo kaj nemalhavebla instruisto, kiu ĉiam invitendas, kaj aktivas, en niaj Somerkursaroj kaj Kongresoj, Marcelo Leereveld, haveblas nun de la verkinto, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $22,00.**

---

***Junulo, post vespero tre ebriiga, iris hejmen per taksio. Dum la veturado li eksenvestis sin. Diris la ŝoforo: "He, he, ni ankoraŭ ne estas hejme!"***

***"Kial vi ne diris tion antaŭ kelkaj minutoj? Mi jam metis miajn ŝuojn antaŭ la pordon!"***

***Muzikologo estas iu, kiu povas legi muzikon, sed ne aŭdi ĝin!***

## Gravaj Esperanto-eventoj

**Merkredon la 4an de oktobro en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**Merkredon la 18an de oktobro en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**Merkredon la 1an de novembro en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**Merkredon la 6an de decembro ni festos la 147- jariĝon de d-ro Zamenhof en Clarence Park.**

**La 22a Somerkursaro kaj Kongreso de A.E.A. okazos inter la 7a kaj 19a de januaro en Hobarto, Tasmanio.**

**De la kvara ĝis la 11a de aŭgusto 2008 la UK okazos en la belega urbo, Jokohamo, Japanujo.**

***"Ĉu vere oni ne devas pagi pro la nomo, kiam oni telegrafas?" demandas la avarulo.***

***"Ne, oni pagas nur pro la teksto."***

***"Nu, bone, eĉ bonege, eble mi ne tute aspektas tia, sed fakte miaj antaŭuloj estis indianoj, mia nomo estas: "Alvenos morgaŭ duonan antaŭ la 10a."***

# Brendan Linnane

**intervjuita de Katja**



**La antaŭuloj de Brendan estis irlandanoj. Kvankam liaj patraj geavoj posedis bienon, ĝi sufiĉis nur por la unua filo, la aliaj infanoj, inter ili la estonta patro de Brendan, devis serĉi laboron aliloke. Li iris al Anglujo same kiel lia estonta patrino, flegistino. Ili geedziĝis en 1943. Unu jaron poste ili havis filinon, la 8an de aŭgusto naskiĝis eta Brendan.**

**En 1950 la familio migris al Aŭstralio, fakte al Adelajdo, esperante ke en la varma klimato estos por la patro-konstruisto multe da laboro. Unue la familio deziris migri al Kanado, kie estas multe da parencoj, sed la timo pri malvarmegaj vintroj malpersvadis ilin.**



Ĉar Brendan naskiĝis en Anglujo, li estas brita. Laŭ la irlanda leĝo, se oni havas patron aŭ patrinon irlandan, oni estas irlandano. Ĝis 1973 validis leĝo, laŭ kiu, se oni estas civitano de Britujo, kaj deziras aŭstralianiĝi, oni simple subskribas formularon formalan. Ne necesis naturaliza ceremonio. Tiel Brendan iĝis ano de tri landoj.



El la 12 lernejaj jaroj gravis por Brendan la lecionoj de la latina kaj la franca, poste tre utilaj por la lernado de Esperanto. Li elektis la profesion de instruisto, por kio la registaro finance subtenis liajn postajn studojn, sed postulis, ke li laboru kiel instruisto almenaŭ tri jarojn. Post tri jaroj kaj tri monatoj en la posteno Brendan konvinkiĝis, ke la instruisteco ne taŭgas por li kaj forlasis ĝin. Li volis nun esti aviada radiisto – tiu, kiu de iu flughaveno donas al la flugantaj aviadilpilotoj la necesajn informojn. Li esperis havi tiun postenon en oktobro 1973 kaj foriris el la instruistaj servoj jam maje por havi tempon vojaĝi tra Eŭropo. Sed la atendoj ne plenumiĝis, li do decidis serĉi laboron en Germanujo. Li dungiĝis kiel civilulo por la aerarmeo de tiea usona militbazo unue por ses monatoj, poste por aliaj du jaroj.

De tie li forvojaĝis al Usono. Kun grupo da dek unu aliaj samaĝuloj li per buseto travojaĝis la landon de Novjorko, Ĉikago ĝis Losanĝeleso kaj reen. Post tiu interesa sperto li iris al Kanado kaj dum ses monatoj li laboris kiel farbisto de internaj muroj de domoj.

Kvar jaroj for de la hejmo sufiĉis, sed revene al Aŭstralio Brendan haltis ankoraŭ en Novzelando, kie li havas parencojn.

Ree en Aŭstralio dum unu jaro li laboris kiel oficisto en social asekuro ka en 1978 li iris al Melburno por preni parton en porradiista kurso. Tie li restis du jarojn, dum kiuj li renkontis, sian unuan edzinon Carol. Kiel radiisto li laboris en Melburno, Alice Springs, ree en Melburno, Adelajdo, Darvino kaj refoje en Adelajdo. Kiam la registaro decidis nuligi la postenojn de radiistoj, Brendan laboris dum kvar jaroj ĉe Ausstudy, oficejo, kies tasko estis distribui la ŝtatan subtenmonon al studentoj. Unu el liaj postenoj estis tiu de kasisto. Kiel kasisto li havis malgrandan oficejon kaj kiam la laboro ne estis tro postula li aŭskultadis la radion. Iun tagon en 1993 li aŭdis tie elsendon de stacio 5EBI, kie Bill Menary kaj Kep Enderby parolis pri Esperanto. Por Brendan estis surprizo, ke tiu lingvo ankoraŭ ekzistas. Li iris al la anoncita prelego en la adelajda universitato kaj decidis lerni la lingvon. En la adelajda biblioteko li pruntepreni

la ususolan tiean Esperanto-libron “Teach Yourself Esperanto”, ekstudis la libron kaj baldaŭ poste eniris la movadon.



La prenadis parton en la Universala Esperanto-Kongreso de UEA en Adelajdo en 1997, kaj parto ĉeestis somerkursarojn en Adelajdo kaj Melburno. Li intencas prenadi parton ankaŭ en la venontaj kursaro kaj kongreso en Tasmanio.

Lingvoj ĝenerale interesas Brendan. Krom la anglan kaj Esperanton li parolas ankaŭ la francan kaj germanan. Eĉ la ĉinan li iom parolas kaj komprenas!

Nuntempe Brendan laboradas por la ministerio de transportado. Li enkomputiligas raportojn pri trafikakcidentoj kaj lokigas tiujn akcidentojn sur la elektronikaj mapoj. Tiaj statistikoj multe helpas en la planado de novaj stratoj, pontoj, trafiksemaforoj ktp.

La edzino de Brendan ne estas esperantisto, sed ŝi plurfoje akompanadis sian edzon al Esperanto-aranĝoj. Ŝi intencas prenadi parton ankaŭ en la venontjaraj kursaro kaj kongreso en Hobarto. Brendan kaj Carol havas kune tri gefilojn, nome du filojn kaj unu filinon.

Al la demando, kion donis Esperanto al Brendan, li respondis: “Per Esperanto mi ekkonis multajn interesajn homojn, kun kiuj mi alie ne renkontiĝus.”

*“Neniu dubo pri tio, ke mia hundo estas elstare bonega. Kaj kiel gardohundo li ests la plej bona en la mondo. Se mi dum la nokto aŭdas ion suspektindan, mi bezonas nur veki ĝin, kaj ĝi bojas!”*

## Raportas Indrani

Meze de aŭgusto finiĝis mia vojaĝo al Uzbekujo. Antaŭ tio mi pasigis du semajnojn en Nordhindujo.

Estis preskaŭ ĉiele eniri Uzbekujon post tiuj du semajnoj da bruego, trafikĥaosego, malpuriĝo, varmego kaj malsekeco (certe pli ol 200%). Estis grandega ĝojego enflugi Taŝkenton kaj poste aliajn urbojn kun larĝaj malplenaj stratoj, preskaŭ neniom da bruo kaj komforta temperaturo (inter 35 kaj 40 centezimalajn gradojn). Estis tie tre seke!

**Du tagojn mi pasigis tie kun lokaj esperantistoj antaŭ ol mi aliĝis al 14-taga ekskurso. Ni estis nur tri personoj interesiĝantaj pri tiu ekskurso. Niaj dek du noktoj en 'simplaj' hoteloj laŭ la reklamo montriĝis esti hotelĉeno kun ĉiuj modernaĵoj inkludante bonegajn bufedmatenmanĝojn. La manĝaĵo en Uzbekujo estas freŝa, tre bongustaj lokaj manĝaĵoj kiaj 'plov', 'lagman', 'ŝaslik', 'melonoj', vinberoj, persikoj ktp.**

**Unue ni flugis al Nukuso en Okcidento, kie ni vizitis la sekiĝintan Lagon Aral, media katastrofo. De tie al urbo Kivo, la unua laŭ la "Malnova Silka Vojo", kun Madrasahoj = lernejoj por knaboj (ankoraŭ uzataj) nekredeblaj moskeoj, maŭzoleoj kaj minaretoj. La plej multaj el ili estas el la 16a jarcento, sed tute renovigitaj en la 20a jarcento.**

**De tie ni iris al Bukharo, kies malnovaj monumentoj pretervivis multajn diversajn konkerintojn. Samarkando estas subĉiela muzeo da renovigitaj moskeoj kaj madrasahoj. La 'Placo Registan' havas iujn el la plej belegaj blue tegolitaj kupoloj kaj madrasahoj. Survoje ni vizitis ankaŭ multajn Ŝtatajn Muzeojn, ĉiuj tre interesaj!**

**En Samarkando mi du vesperojn vizitis lokajn esperantistojn, kio ĉiam estas unika travivaĵo, ebliganta onin ekkoni la veran vivon en Uzbekujo male al tiu priskribita en la turistbroŝuroj. Unu nokton ni dormis en jurto en la dezerto Kyzyl Kum. Oni diris, ke tie varmas 46 centezimalajn gradojn. Oni proponis al ni iri naĝadi. Post 45 minutoj da ostorompa veturado en malnova rusa ĵipo tra neniam finiĝantaj dezertaj vojetoj ni finfine alvenis al Lago Ĉandaro. Tiu lago estas grandega kun bonega, freŝa akvo klara kaj malvarma. Ni ĉiuj restis en ĝi pli ol nur unu horon!**

**Post admirado al pli da vidindaĵoj en Taŝkento (pli da moskeoj kaj madrasahoj) ni alvenis al Valo Fergano. Ni vizitis silkfabrikon, en kiu ĉio faratas nature. Tre admirinde, sed mi, 'industriiĝinta' civitano konkludis, ke tio estas tro da peza laboro rezultanta en tro altegaj prezoj.**

**Tiun vesperon ni vespermanĝis, distriĝis kaj dancadis en diskoklubejo. Tio amuzis min, ĉar estis vendredo en ĉefe islama lando!**

**Fine de la ekskurso mi suferis teruran dudek kvarhoran diareon. Mi sentas min tre elsekigita nuntempe. Bonŝance mi ne forflugos al Delhio la unuajn du tagojn. Espereble mi estos tute resaniĝinta tiam.**

***Indrani***

## Pli bonaj bibliotekoj

**Mi pensas, ke la nuna dumpingo de Telstra kaj aliaj monoj en nedifinitan "Futuran Kason" montras kompletan mankon de imago pri la speco de Aŭstralio, kiun ni ĉiuj deziras havi.**

**Jam multajn jarojn mi provas akiri federacian monhelpon por la publikaj bibliotekoj de Aŭstralio, sed sen kiu ajn sukceso.**

**Sed restas la fakto, ke sesdek procentoj el aŭstralianoj membras en la publikaj bibliotekoj, kaj ni ĉiuj ŝatus havi pli bonajn bibliotekojn.**

**Tial federacia mono al la bibliotekoj helpus rilate la estontecon de ni ĉiuj!**

***Arturo Mortimer***

**Por tiuj el vi, kiuj intencas preni parton en la venontjara Universala Kongreso de UEA en Jokohamo, ni publikigas la ĉisuban anoncon:**

**Se vi deziras ekhavi leteramikojn en Japanujo, skribu al Japana Esperanto-Koresponda Servo, KLEG, Sonehigasi 1-1146-204, Toyonaka, JP-561-0802, Japanujo.**

**Skribu ne per reto, sed nepre per afrankita letero aŭ poŝtkarto, kaj preslitere viajn nomon, adreson, aĝon, sekson, okupon, interesojn ktp.**

Nia servo nepre sendos karton por konfirmi ricevon de via letero.

*MINE Yositaka*

## Alvoko al la agotago en 2006

Antaŭ longa tempo oni decidis dediĉi la unuan sabaton de oktobro al la "agotago", t.e. al tago de agado por informi pri Esperanto kaj pri la ideoj de la movado por la internacia lingvo.

Ĉijare tiu unua sabato estos la 7a de oktobro 2006.

Kiel kutime la estraro de UEA invitas ĉiujn preni parton en la agotago je la plej alta agadnivelo ebla laŭ la lokaj kondiĉoj. Kvankam ĝenerale vi prezentos Esperanton laŭ la normalaj ideoj de nia movado, kie necesos aparta temo, tiu povas esti kunligata kun la rezolucio de la lasta Universala Kongreso en Florenco: "Esperanto kiel rimedo por daŭropova pluvivo de ĉiuj lingvoj kaj de ĉiuj kulturoj".

Fakte ni volas defendi ĉiujn lingvojn, la naciajn lingvojn grandajn kaj malgrandajn, la malplimultajn lingvojn, kaj la historie ĉeestantaj kiel ankaŭ tiujn de enmigrintaj grupoj. Tie kuŝas nia malsameco rilate al tiuj, kiu okupiĝas nur pri efikeco en komunikado de supro al malsupro (internacie kaj ensocie), kaj kiuj ŝovas la pezon de la komprenado kaj la problemojn de lingvolernado al la internacie kaj ensocie malplej fortaj homgrupoj.

Dum la komitataj diskutoj en Florenco estis reprenitaj la konsideroj pri la neceso havi malsamajn agotagojn en malsamaj mondpartoj, ĉar oni devas konsideri ĉefe la malsamajn momentojn, en kiuj finiĝas la ferioj kaj rekomenciĝas la laborjaro. Tio estas nun efektiviginda pro la reala tutmondeco de Esperanto. En ĉi tiu transira jaro okazu diskutoj en ĉiuj monpartoj inter esperantistoj pri la plej bona periodo kaj tago en la koncerna mondparto kaj okazu ankaŭ apartaj provoj de agotago en la elektita

**periodo. Tiuj kromaj agotagoj aldoniĝu al la nun anoncata tago.**

**Cetere en Eŭropo mem oportunas ligi la agotagon al la dato 26a de septembro, Eŭropa Tago de Lingvoj, kiu ne estas malproksima de la unua sabato de oktobro. Ni invitas ĉiujn esperantistojn loĝantaj en la landoj de la Konsilantaro de Eŭropo ligi Esperanton al la jam antaŭviditaj lingvaj eventoj, cetere videblaj en http://www.at/edl/find.asp?s=EV, kaj al kiuj oni povas facile kaj libere aldoni tiujn pri Esperanto.**

**La devizo de la Eŭropa Tago de Lingvoj estas: "Celebri lingvan diversecon, multlingvecon kaj dumvivan lingvolernadon", sed ilia reta paĝaro pri la tago estas en nur du grandaj lingvoj.**

**Ni akceptas ilian devizon kaj sincere aplaŭdas ĝin, sed ni devas komprenigi al ili kaj ĉefe al niaj kuncivitanoj, ke lingva diverseco kaj multlingvco povas flori stabile kaj pluekzisti nur se oni permesos al Esperanto ŝirmi la ceterajn lingvojn. Esperanto povas fari tion, ĉar pro manko de grupo, kiu utiligas ĝin por altrudi apartan kulturon kaj en la fino la superregado de la anoj de tiu kulturo, ĝi estas la sola internacia lingvo nelingvomanĝema.**

***Renato Corsetti***

## Al Esperanto en Sudaŭstralio pagis jam:

**Arturo kaj Libby Mortimer; Audrey kaj Bob Felby; Jennifer Jefferies; Katja kaj Trevor Steele; Helena kaj Sandor; Indrani Beharry-Lall; Pat Palmer; Annie kaj Ashley Campbell; Eileen Jones; Nancy Roy; Gloria Bristow kaj Roŝela Lorraine Jaquier.**

***Turistgvidanto: Tiuj el vi, kiuj deziras viziti Diabloinsulon, levu la voston!***